E. Redorost,

Venas ree la aŭtun'

tradukita de Manfred Retzlaff

Venas ree la aŭtun',
montras sian forton nun,
metas al la arboj ĝin,
kaj ĝi ege streĉas sin.
Ĉiuj arboj skuas sin,
ĉagreniĝas je la fin'.
Tiam fajfas kanton ĝi,
Ekaŭskultas ĉiu foli',
restas tiu nun ne plu,
pro la forta vento-sku'
de branĉar' sin turnas for,
dancas tra l' aero por
fali al la tero nun,
kaj plu kantas la aŭtun'.

Traduko de la Germana poemo "Kommt der liebe Herbst ins Land" de E. Redorost en Esperanton de Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2004-09.*

MR-431-1 / Arg-800-1605 (2013-01-31 09:52:54)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poemon en 2004 sur la reta paĝaro `http:\\cyberhexe1.piranho.at`. *Siehe auch:* `http://cyberhexe1.piranho.de/`.